

Nur vantaĵo

(originale verkita en Esperanto)

1. Nur van - ta - ĵo, laŭ Ko - he - let,
2. Van - taj es - tas bo - na no - mo,
ja ĉi - o es - tas van - ta nur.
ri - ĉe - co, saĝ' aŭ vi - vo - ĝu'.
Mi ak - cep - tas, vi - vas ĝo - je
Ĉi - o ha - vas si - an tem - pon
ka - dre de l' na - tur'.
kaj ne res - tos plu.

3. Kiam lum' de l' sun' kaj luno
kaj de la steloj estos for,
kaj ne plu por mi videblos
glimo de l' aŭror',

4. kiam miaj muelantoj
ne plu muelos en la buŝ',
kiam mi sur ĉiu strato
timos eĉ pro ŝuŝ',

5. tiam mi al mia domo
eterna iros laŭ destin',
mia spir' al mia Dio,
kiu donis ĝin.

6. = 1.

NUR VANTAĴO • M (Windhauch): Albrecht Kronenberger ĉ. 1980 • E (originale verkita): Albrecht Kronenberger 2017-08-24

Komparu ekzemple:

Strofo 1: Koh 1,2; 5,18; 3,12

Strofo 2: Koh 7,1; 3,1

Strofo 3: Koh 12,2.5

Strofo 4: Koh 12,3.4

Strofo 5: Koh 12,5.7